Google festis la 15an de decembro la Zamenhofan tagon!

Google

# Kien iri ?

**Bulteno eldonita de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono**

# Sudfrancia Stelo

95a Universala Kongreso de Esperanto


Havano, 17–24 julio 2010




6-a Azia kongreso de Esperanto

19-23 JUNIO 2010

ULANBATORO MONGOLIO




Franc-germana kongreso 21-24a de majo 2010 en Kaiserslautern !

espéranto France

Sète ĉe Mediteraneo

*Interasocia Renkontiĝo paske 2011*

SETE 2011

Ek de januaro, nova teamo redaktos nian federacian bultenon SUDFRANCIA STELO pro demisio de J.Hénin. Ek de nun bonvolu sendi viajn informojn, artikolojn, fotojn kaj novaĵojn al Christian MOURE 15, chemin du Verdier 34120 TOURBES (xianmoure@orange.fr). Li akceptis transpreni la taskon ĝis nia jara kunveno la 18an de aprilo 2010 en Vergèze (30). Tiam la mandato de 3 jaroj de la nuna estraro finiĝos, ni devos elekti novan estraron interalie novan redaktoron.

Dankon al ĉiuj por viaj kontribuoj al SFS

# La Zamenhofa tago en Montpellier

**La 12an de decembro, en la Ĉies domo Escoutaïre, 18 gesperantistoj kuniĝis en la salono por festi tiun memorindan datrevenon .**

La vetero estis agrabla, preskaù printempa . De la 10a ĝis la duono, ĉiuj trinkis kafon, teon, fruktosukon kaj gustumis bonajn kuketojn kaj delicajn ĉokoladojn !

Samtempe ĉiuj babiladis kaj rakontis okazintaĵojn de la pasinta monato .

Kvarono antaù la 11a, la Prezidanto silentigis kaj sidigis ĉiujn, por paroli iomete pri la aferoj de la Asocio, ĉefe pri la vizito de japanoj (ili estos en Montpellier de la 23a ĝis la 26a , sed oni ne scias kiam okazos la prelego. Oni diros pli poste.) kaj la demandoj kiujn oni faros al ili (paperfaldaĵo, kutimoj…).



Poste li diris, ke kelkaj amikinoj preparis skeĉetojn : la silenton oni ne bezonis demandi !

**Maria** kaj **Rosy** ludis 4 aù 5 skeĉojn, **Monique** kaj **Josee** ludis skeĉon skribita de Leo Lentaigne antaù 6 jaroj, li skribis ĝin, laù la satira poemo de Julius Baghy, **'Estas mi Esperantisto'.** Leo skribis tiun tekston por Jacqueline kaj mi, ni ludis ĝin en La Dragonnière, eble en 2004. Ĉiuj povis aùdi la voĉon de Leo kiu deklamis '**La voĉo de Zamenhof**'. Kiam Leo skribis la tekston, tuj mi surbendigis lian voĉon.



La tempon ankoraù ni havis kaj multaj rakontis humuraĵojn ne ĉiam decaj, sed kiuj ridegis la ĉeestantojn. Ĉu mi rakontas unu al vi ? Jen ĝi:

***- Bervalino iras al kuracisto, 'Sinjoro doktoro, mi ŝatus havi infanon kaj mi ne sukcesas'.***
***- Sinjorino, bonvolu senvestiĝi kaj kuŝiĝi ĉi tie .***
***- Sed sinjoro doktoro, mi preferus ke la infano estus de mia edzo !!!!***

Finfine ni sukcesis kantigi la grupon, dank'al kasedo kiun ni povis aùskultigi al ĉiuj, tiel ni kantis **: La Esperon , Esperantan Himnon…** iom post la 12a ni estis pretaj tagmanĝi la kunportitajn manĝaĵojn kaj dolĉaĵojn . Kompreneble, ni ne forgesis la aperitivon !!!



Ĝojo estis partigi tiun belan tagon, kun gesinjoroj Taupiac, Johano Martineto kaj nia amiko Johano-Maria Lot, kiu bedaùrinde ne plu povas partopreni la kursojn ! Grandan kaj amikan penson, ni havis ankaù por Jorgo kiu ne ludis kun ni tiun jaron ! ! ! ! ! J. Boccadifuoco.

**Zamenhofa tago en Nimeso**

La 15an de decembro, la Nimesa esperantista kultura klubo festis Zamenhofan naskiĝon. Estis la unuafojo ĉar la pasintaj jaroj ni estis nur kvin membroj. Tiun jaron, ni estas dek membroj sed nur ok partoprenis. La festo okazis en la prezidanta domo.

Ĉiu partoprenanto decidis porti diversajn manĝaĝojn, pretigitaj hejme . Post la matenaj kursoj (ĉar mardo matene okazas niaj regulaj kursoj), ni pretigis la manĝon.

Estis mirinda: Ĉiuj libroj, paperoj, vortaroj, globkrajonoj malaperis de la granda tablo, kie ni ĵus lernis. Tri minutojn poste, la tablo estis kovrita per tablotukoj, plateroj, glasoj, manĝaĝoj, vino k.t.p.

Antaŭ mangi, ni kantis "Esperon". Sen provludo, la rezulto estis mezbona! Kara Zamenhof, pardonu nin! Nun, la apetito estis malfermita, ni komencis manĝi. La etoso estis tre bona. Ĉiu klarigis la kialon, kiu decidis ilin lerni Esperanton. Ni finis la feston kun glaso de ŝaŭma vino. Bonvolu ne raporti al la Zamenhofaj manesoj ke ni krokodilis! Pro la diskutado (ne pro la vino!), ni forgesis foti la feston. Ne gravas, ni rekomencos venontan jaron! F. Bourquin

## Zamenhofa tago en Béziers

Kiel kutime, la C.B.E. festis la naskiĝotagon de Dr. Zamenhof.
Pro neĝo, la lozeranoj ne venis kaj iu sugestis festi la eventon en junio,
bedaŭrinde neniu aprobis... Tamen alvenis amikoj de Perpignan, Montpellier kaj de ĉirkaŭaĵaj vilaĝoj.

La granda salono ne estis sufiĉe varma sed la ĝenerala bonhumoro permesis suporti tiun ĝenon kaj varmigi la etoson.

Post la kafo kun kukoj, Veronika nia prezidantino akceptis la ĉeestantojn kaj rememorigis Suzanne Authier per silentminuto. En Aprilo, ni metos plakon sur ŝian tombon.

Genova prezentis siajn fotojn kaj tiujn de Josée rilate al la kongreso en Bjalistoko. La vojaĝintoj aldonis siajn komentojn kaj, tiele, ili tre plezure revivis la kongreson.

Pli poste, Genova kaj Waclava faris paralelon inter Zamenhof kaj Jaurès: ambaŭ batalis por paco, la unua pere de la lingvo la dua pere de la politiko. Tre interesa kaj originala parolado (legu sube): la grupo varme dankegis ilin por tiu impona laboro.

Unuj preferis manĝi en restoracio, aliaj surloke. Posttagmeze, Loulou prezentis la programon: skeĉojn, rakontojn, serĉojn, poemojn, ludojn.

Waclava legis poetikan historion pri la beleco de la muziko. Du skeĉoj multe amuzis: unue 'la koncerto' (**Genova kaj Lina** (*vidu sube*)), due 'la Kvara etaĝo' (Evelyna kaj Veronika). Tiuj lastaj nomataj, por ilia unua skeĉumado montris multe da talento.

Fernanda, nia fama poetino, legis belajn poemojn; Dalia, Waclava,
Loulou legis gajajn serĉojn; Veronika gvidis amuzan ludon; finfine ĉiuj ni proklamis 'Esperanto belega lingvo, esperantistoj bonaj amikoj'.

La C.B.E.

La membroj de la C.B.E deziras al ĉiuj legantoj de S.F.S., "bonajn festojn, bonan novan jaron!".
Datoj de la kunvenoj

(en M.V.A. je la dekvara kaj duono)
9/01/2010: nova jaro, reĝa kuko
17/02/2010: ludoj
6/03/2010: ĝenerala kunveno
13/03/2010: monata kunveno

En aprilo, la grupo de Béziers invitas vin por viziti la Malnovan Tombejon de Beziers. Unu jaro post la morto de Suzanne Authier, ni omaĝos ŝin per memoriga plato.

## Du Homoj por la paco

Dum la jaro 2009, oni memorfestas la naskiĝtagon de **Zamenhof, la kreinto de la Internacia Lingvo** . Sed **ankaŭ Jean Jaurès naskiĝis en la jaro 1859** kaj la du homoj samopiniis pri la Homoj kaj la Socio.

Sed la du ne havis saman vojiron: **Jaurès vivis en Francio en la urbo Castres** en burĝeta familio . Li plenkreskis dum la tria respubliko . Plie Jaurès eniris en politikon kiam li estis 25 jaraĝa. Li forĝis sian socialisman idealon nur kiam li estis 33 jaraĝa.

Aliflanke, **Zamenhof vivis en urbo Bjalistoko** kaj ofte vizitadis la bazarplacon, kie li eksperimentis ek de la infaneco la malfacilecon de la ĉiutaga vivo pro multeco da lingvoj uzataj en la urbo .

En tiu epoko, Bjalistoko ne estis pola urbo: ĝi apartenis al la rusa imperio. Tio signifas, ke la loĝantaro parolis: rusan, germanan aŭ polan lingvojn. Plie, li mem estis judo kaj ankaŭ parolis la hebrean same kiel la multnombra juda komunumo.

Zamenhof, frue revis pri ununura lingvo por la tuta homaro. De siaj observoj, li konkludis, ke la homoj devus pli bone kompreni sin reciproke, ke per paco rezultus bonan mutualan komprenemon.

La du homoj estis spritemaj lernantoj: Jaurès en liceo Louis le Grand (Paris); poste, la supera normala lernejo (strato Ulm Paris). Li fariĝis



Filozofia Profesoro.
Jean Jaurès, komprenis la gravecon de multlingva edukado. Li diris, ke en suda Francio, la popolaj infanoj devus lerni ' okcitanan ' lingvon, tiel ili scius retrovi la samajn vortojn en du malsimilaj formoj (franca kaj okcitana). Tio helpus ilin kompreni italan, katalunan, hispanan, portugalan lingvojn.

Zamenhof studis medicinon en Moskvo kaj en Varsovio; samtempe, li ĉiam okupiĝis pri sia ideal **: unuigi la popolon !**
Li komencis malfacilan laboron de kuracisto kiel kuracisto de malriĉuloj. Sed li estis tro kortuŝema kaj donacema por praktiki tian profesion.
Pro ega diferenco inter la medicina lerno kaj la realeco de la laboro kaj vidante la suferon, mizeron de malsanuloj, la pacema idealisto, kiu estis Zamenhof, antaŭ tro da maljusteco, ne plu povis daurigi en tiu profesio ! Do li iĝis okulkuracisto .

Ankaŭ al Jean Jaurès ne plaĉas maljustecon. Pri la afero Dreyfus, unue, li estis konvinkita de lia kulpo. Sed, post pripenso, li komprenis sian eraron . Poste, li defendis lin per artikoloj en < La Dépèche du Midi >, kie li skribis lian tutan vivon . Dank'al sia ega oratora talento, li batalis ĝis la justa kaŭzo triumfis !
Jaurès batalis ankaŭ pri sociala respubliko ĉar la laboristoj, eĉ partoprenante en politiko kaj estante potencega voĉdonanto, estis kiel servuloj en la laborejoj .

**La du viroj samopiniis, ke la justeco, ne nur estas individua afero, sed ankaŭ respekto de la tuta homaro.**

**En 1887, Zamenhof eldonis la Unuan Libron pri la Internacia lingvo** . Poste, tiu lingvo estis konata, lernata, eĉ de la Volapukistoj, kiuj fine elektis Esperanton . Dum pluraj jaroj la esperantistoj korespondis Esperante**. La unua kongreso okazis en Francio en 1905.**

Zamenhof, kiu akceptas dum la kongreso, la ideon, ke **'povas sin diri esperantisto, ĉiu kiu uzas la esperantan lingvon, sendepende la celo uzata por ĝi'**, pledis pri la : **Interna Ideo**, kiu estas '**frateco kaj justeco inter la tuta homaro**'.

Zamenhof trudas neniun aliĝi tiun ideon. Li pacience kaj ne perforte provas ĉiam konvinki kun ega morala forteco .

**Jaurès volas** konstrui laikan, tolereman respublikon, definitiva **' paca reĝimo'**, kie la malsamaj konceptoj ŝokus nur pro la forteco de la ideoj, neniam perforte . Libereco por ĉiu homo, **'ĉiu homo devas libere opinii ', libereco por la laboro**, estas la plej grava afero inter la homaj rajtoj !

La jaro 1905 estas por la du homoj, luksa kaj fruktedona jaro:

Zamenhof konkretigas sian idealon:

- La unua Universala Esperanta Kongreso, en Bulonjo ĉe maro, kun 688 partoprenantoj, el 20 landoj. Tio estas pruvo, ke skribe uzata ĝis nun, Esperanto perfekte funkcias parole inter la kongresistoj.

**Jean Jaurès estas ĉefa aktoro de la unuiĝo de la socialistanoj .**

- Dum la kongreso de la Globo (nomo de la kongresejo en Paris), li ellaborigas la francan sekcion de la Laborista Intemacio (SFIO) kiu unuiĝas 'samideanoj socialistoj'. Li opiniis, ke per la Internacio, Europo evitos la militon ....

La 5-a de decembro 2009 MVA de Béziers
Geneviève, Waclawa, Josee
(Documentation: journal de la ville de Toulouse.
Livre ' l'homme qui a defié Babel' de R. Centassi et H. Masson).



**17-24. Aprilo** Festenkonto Internacia de Geknaboj = **FRINGOJ** en Bondy (apud Parizo) Francujo. Inf: Elizabet Barbay ( eliz.barbay@wanadoo.fr )

## Rakonto pri la kukurbeto

Matene, kiam mi matenmanĝas, mi aŭskultas radioelsendon: la parolanto, kadre de la precepto "kvin fruktoj, kvin legomoj tage" detaladis la grandnombrajn kvalitojn de la kukurbeto.

Vere, mi ne imagis la bonfarojn de tiu legomo falinte en niaj teleroj: donaco de la ĉielo. Tio pripensis min nian restadon (Genova kaj mi) en Kvinpetalo dum dekkvin aùgustaj tagoj, kie ni kuiradis la manĝaĵon por multaj personoj.

Pripensi la menuon ne estis facila afero ĉar, plie, ni ne povis elspezi multe da mono... La junuloj havis grandan apetiton, tiam kio meti en la kaseroloj?

Feliĉe, Bernardo ofte helpis nin. Li ne estas la muta servisto de Zorro sed la filo de Georges Lagrange, tre konata esperantisto. Li laboras en "ĝardeno de readaptado" proksime de Kvinpetalo. Pro la talento de la ĝardenisto, la fekunda tereno, la dolĉa vetero, la rekolto abundis. Do, Bernardo kunportis grandajn korbojn ĉefe plenplenaj da rugaj tomatoj kaj dikaj kukurbetoj.

Post la matenkurso, ni senŝeligis, tamen lasinte iomete da ŝelo. Tiu
laboro daŭris longtempe kaj poste niaj malfeliĉaj fingroj aperis verdaj same kiel tiuj de "E.T." la neteranulo. Kiam, fine ni sukcesis malplenigi la korbon, ni ĝojis. Ni kuiris la tuton laŭ la recepto de Genova (legu ĝin sube). Kaj vidu: ĉiam la pladoj revenis sen restaĵoj. Eĉ ŝajnis al ni ke iuj purigis la pladojn per pano aŭ (nekredeble!) fingroj.

Ju pli ni preparis kukurbetan kaŭĉon des pli la geestantoj manĝis!

Tutcerte ni estas (Genova kaj Line) "la reĝinoj de la kukurbeta kaĉo".

Se, denove ni revenos al Kvinpetalo, mi opinias ke la revenontaj staĝanoj, kisos nin dirante: ĉu ni manĝos kukurbetan kaĉon, morgaŭ?".

Kukurbeto, kukurbeto
Delikata legometo!
De vi dependas nia gloro
Ni senŝeligos, al la laboro!

Line

**Kukurbeta Kaĉo**
(recepto laŭ Genova)

Kukurbetoj (600g)
Seka pano (200g)
Salo, pipro

Senŝeligu la legomojn, oleu kaserolojn, aldonu iom da akvo, metu kukurbetojn dum kelkaj
minutoj en kaserolo. Aldonu sekajn panpecojn, akvon, salon, pipron, miksu la tuton.

Metu la kaĉon en butera gratinplado, kovru per fromaĝo kaj enfornigu en varman bakujon.

Bonan apetiton

# Vojaĝo en Brazilo per esperanto (dua parto)

Ĉiutage, eblis bone tagmanĝi surloke en la trinkejo. La tagpaŭzo estis longa, du horoj kaj duono, sed ĉiam okazis interesa kultura evento kiel knabina koruso tre altkvalita, kantado, prezentado de cirko ...

La vesperprogramoj ankaŭ estis interesaj. Lundon, arta vespero : diversaj esperantaj amatoraj artistoj prezentis muzikojn, kantojn, poemojn... sed estis ankaŭ profesia ege bona koruso ! Mardon, teatraĵo pri la vivo de L.L.Zamenhof. Bedaŭrinde mi tre malfacile sekvis ĉar okazis portugallingve, eĉ la parolado de Zamenhof dum la Unua Universala Kongreso ! Plie, laŭ mia opinio, tiu rakonto estis ege rapida kaj ne tiom bona (mi parolis poste pri ĝi kun teatramatoro, kiu pensis kiel mi).

Merkredon, balo al kiu mi ne partoprenis : ni festis mian naskiĝdatrevenon surprize, oni decidis por mi ! Ĵaŭdon, Julia festo dum kiu ni dancis kvadrilon. Estis ege amuza, eĉ se la gvidantino ne bone konis la dancon !

Dum la kongreso, mi renkontis multajn interesajn kaj agrablajn homojn kaj kelkaj invitis min. Mi amikumis kun pluraj. Inter ili, estas paro kiu intencis viziti historiajn urbojn post la kongreso. Mi akompanis ilin kaj kune, dum kvar tagoj, ni vojaĝis en Ouro-n Preto-n kaj Mariana-n kie portugaloj malkovris nigran oron (ne petrolo !) kaj gemojn, do ili havas multegajn kaj belajn preĝejojn. Ni ankaŭ, sed rapide, vidis Belo-n Horizonte-n. Tiuj urboj estas tre interesaj historividpunkte ĉar la unuaj bataloj por sendependeco okazis tie.



Junuloj kiuj organizis feston por mia naskiĝdatreveno.

Mi vizitis poste Divinopolis, en Minaso (kie mi neniam havis okazon malsati !), Brazilio kiu havas tre belajn kaj originalajn preĝejojn (sed kie la vetero estas ege seka !), Bona Espero kiu estas tre bela loko (sed...), Goiânia kiu estas konata pro arba diverseco, kaj Pirenopolis kiu estas tre agrabla urbeto kun akvofaletoj.

Ĉie kien mi iris, esperantistoj ĝojegis gastigi min, donacis al mi diversajn aferojn (tiel mi revenis kun 5 T-ĉemizoj !). Mi estis tre bonvena, kaj pluraj invitis min denove ekde kiam mi estas en Francio.

Brazilanoj estas tre donemaj, sed ankaŭ zorgemaj : neniam mi havis okazon aĉeti busbileton sola ! Ĉiam estis esperantisto kun mi, eĉ kiam mi nur trapasis la urbon, kiel en Brazilio !




Estis ege agrabla vojaĝo, kaj mi esperas ke mi povos gastigi kelkajn inter miaj novaj brazilaj amikoj baldaŭ...

Véronique Bichon


## Zamenhofa tago en Avinjono

Patrick Lagrange matene prelegis pri :

**'Ĉu ni estas solaj en la universoj ?'**

Li prezentis la faman naturaliston Karolo Darvin (1809-1882) en lia tempo, la ĉefan verkon de Darvin : La origino de specioj (1859), kiu ĵus estis eldonita de FEL, kaj en kie Darvin provis la evoluadon ; kaj finfine li parolis pri Darvinismo hodiaŭ.






Rose-Marie, kiu multe zorgis pri la sukceso de la tuta tago kantigis nin post la manĝo, kaj ankoraŭ kun membroj de la grupo ludis skeĉojn, kiuj estis iaj amuzaj aliaj pripensigaj, ĉiuj agrablaj. C. M.



## ZAMENHOF-TAGA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

Hodiaŭ ni festas la centkvindekjaran datrevenon de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Ni reliefe rimarkas ankaŭ, ke ĝuste tiun ĉi tagon, en la lingvojubilea jaro 1987, forpasis profesoro Ivo Lapenna – kies centjaran jubileon ni ĵus festis, antaŭ nuraj ses semajnoj. La koincido de korifeaj datoj hodiaŭ venigas al krona fino nian jubilean sezonon komenciĝintan antaŭ pluraj jaroj – jam en 2005, cent jarojn post la prakongreso en Bulonjo sur Maro. Nun, fine de la jubileado, certe rekaptos sian ritmon nia ordinara ekzisto kiel valanoj. El tiu ordinaro ni venis grimpe al la jubilea pinto. Tiu pinto, por multaj el ni, prenis la geografian formon de reiro al la komencpunkto de Esperanto – Bjalistoko! Nun ni reiras al niaj valoj.

Kion ni portas kun ni tien? Ĉu la jubileoj ŝanĝis nin? Eble pli bonan konon de la vizaĝoj, kiujn ni atente rigardis en fotaj ekspozicioj kaj per aliaj rimedoj dum la jubileaj jaroj. Tamen, ĉu efektive? Ĉu al niaj grandaj korifeoj ekde Zamenhof ni omaĝantoj ne ŝuldas, ke ni lernu de ili la gravecon de renkontiĝoj de "homoj kun homoj"?

Por persone iom konatiĝi kun la situacio rilate la biografiajn informojn, mi serĉis la vikipediajn indikojn, specimene, pri du hazarde elektitaj esperantistoj, kiuj en niaj vicoj rolis kiel ordinaruloj, kvankam ekster Esperantujo ili estis pintaj figuroj – Rudolf Carnap kaj Joan Mascaró i Fornés. Mi konstatis, ke eĉ broŝuretoj, kiuj prezentus ilian vivon tra esperantista prismo, ankoraŭ ne disponeblas, kvankam ekzistas fontoj por pli bone konatiĝi kun ilia vivo.



Per stervikipedia vojo mi ekaŭdis, ke la esperantistino Elisabet Abeyà okupiĝis pri la katalunigo de lia anglalingva verkaro. Mi estas certa, ke ŝi ankaŭ helpos plialtigi lian profilon inter la esperantistoj, kaj ke ĝenerale niaj historiistoj kaj biografoj iĝos multe pli aktivaj, se nia komunumo donos iom da prioritato al tiuspeca laboro. Mi tuŝas ĉi tiujn detalojn por tiri vian atenton ĝuste al tiu altkvalita atento, kiun Zamenhof en sia laboro dediĉadis ĝuste al la detaloj. Mi same detal-atente aŭskultos viajn apartajn emfazojn aperantajn en tiu ĉi tago grava al ni ĉiuj, kiujn sendube ĉiu "al si malsame prezentas". Por fini, mi invitas vin kunstari kun mi sub la arbego, kiun kreskigis por ni Lazaro Ludoviko Zamenhof – kaj voti, ke ni profundigos ĝiajn radikojn en nia humo.

Probal Dasgupta
Prezidanto de UEA

**UEA 17. aprilo** :32-a **Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando.** Prelegoj (i.a. Mark Fettes), filmoj, libroprezentoj, k.a. En la libroservo ĉio rabatita; senpagaj kafo kaj teo. Inf.: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Rete: uea@co.uea.org

**Congrès international des espérantistes catholiques, à Paris, 27 juin - 3 juillet 2010 http://www.ikue.org/**




- **Ĉu vi ŝatas Esperantvivon**
- **Ĉu vi ŝatas malkovri novan lingvon**
- **Ĉu vi ŝatas maron**
- **Ĉu vi deziras bretone danci**
- **Ĉu vi deziras krespojn manĝi**
- **Ĉu vi deziras Bretonion malkovri**

**Bonŝance vi povos partopreni la 65an kongreson de SAT-Amikaro kiu okazos en Hiliono, ĉe la golfeto de San-Briego en la departemento 22 « Armoraj Marbordoj » dum paska periodo de la 3a ĝis la 6a de aprilo 2010. Ĝi okazos en la kultura centro « Georges Palante » en urbeto Hiliono.**

- **Ni Kriz-kontraŭu !**
- **Kia socia organizado por estonteco ?**

Multaj debatoj, kunvenoj, ekskursoj ne sufiĉos por malkovri nian regionon. Vi konsentus, ĉu ne ? Aliĝu la kongreson por festnozumi kaj gustumi krespojn en gaja bretona etoso.

**Programme touristique**

## Visite de Saint Brieuc

(en collaboration avec l'office de tourisme de St Brieuc)
Nous vous invitons à une remontée dans le temps en déambulant dans les vieux quartiers de la cité briochine.
De la cathédrale forteresse au port du Légué, en passant par les ruelles bordées de maisons à colombages, le parc de Rohannech et son point de vue sur la baie du Légué, laissez vous raconter Saint–Brieuc.

- Lundi 5 avril 2010 – 15 H à 17 H – 6 €.

## Visite guidée de la briqueterie

Au fond de la baie de St Brieuc, se trouve un lieux unique, mémoire de ses habitants. Découvrez comment ses habitants ont su, avec persistance, ingéniosité et courage, exploiter cette richesse naturelle de la baie, pour vivre ici et développer une économie prospère.

- Samedi 3 avril 2010 - 14 à 16 h - 8€.

## Randonnée de la presqu'île (à faire seul)

Du chemin des douanniers qui surplombe la mer, vous découvrirez la réserve naturelle, d'un bout à l'autre de la baie. Des paysages contrastants et variés où faune, flore, bouchots se donnent rendez-vous.

- Petite randonnée de 8km, durée 3 h. (prévoir une tenue adéquate)

## Mytiliculture en Baie de St Brieuc

(horaire particulier en fonction de la marée 16 h)
Au cours d'une brève promenade au centre de la zone myticole, vous comprendrez tout sur l'élevage des moules. Des naissains de moules à votre assiette vous découvrirez cette profession mi-agriculteur, mi-marin.
Promenade de 3 à 4 km sur la grève

- Date : samedi 3 avril 2010
- Horaire : 16 – 18 hh
- Coût : 8€
- (prévoir équipement adéquat)

## Excursions d'une journée

**« Tous à l'Est »** : Mardi 6 avril 2010 de 9 h à 17 h : Coût 30€ (déjeuner « Les Pifaudais » à Quévert.

- Sur les traces des Ducs de Bretagne, au Moyen-âge à Dinan, Quévert et dans le Léhon ; promenade le long de la rivière « Rance ».

**« Tous à l'Ouest - chez les gaulois et Plouezek »** : Mardi 6 avril 2010 de 8h à 19 h : Coût 35€ - 170 km, (déjeuner au village gaulois). Ensemble découvrons la magnifique côte de granit rose ainsi qu'un authentique village gaulois.

### Soirées culturelles

"Mervili"
Concert de guitare classique (Lino Markov)
Oratorio : Canto General par le Choeur espérantiste Interkant'
Concert de Gijomo : « chansons issues de l'agriculture biologique »
Spectacle : "La Atendejo" par La Maretanoj

## Conférences débats

« Louis Guilloux l'insoumis »
La bataille de l'eau en bretagne.
Abeilles en danger : le témoignage de deux apiculteurs.

OKK SAT-Amikaro 2010 - Esperanto 22 ĉe
Alain Le Mau 9 rue de St Aubin 22120 YFFINIAC
satamikaro.armor2010@gmail.com

Ces derniers temps, Hillion devient célèbre en France pour ses algues vertes et ses dangers. Avec l'appui des élus locaux, notre congrès permettra de donner une toute autre image de la commune au-delà des frontières de notre hexagone.

L'association *Espéranto 22* concocte ce congrès, sous la houlette d'un comité d'organisation.

# 36-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO ĉe MEDITERANEO

**de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto 2010 en Sète - Feriejo « Le Lazaret »**

***ESPERANTO, KULTURO KAJ PROGRESO proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto. Samtempe , trapasu agrablajn feriojn ĉe mediteranea marbordo en ripoza parko. Ni proponas plurnivelajn kursojn, ekskursojn kaj distran programon. Ni atendas vin !!***

| | | | |
|---|---|---|---|
| Aliĝkotizoj : | 65 € antaŭ la 1-a de majo 2010 | *Adhésions :* | *65 € avant le 1er mai 2010* |
| | 80 € post tiu dato | | *80 € après cette date* |
| | 20 € por kunuloj | | *20 € pour les accompagnants* |
| | 10 € por malpli ol 26 jaraĝaj | | *10 € pour les moins de 26 ans* |

Loĝado : pluraj eblecoj
- En « Lazaret » jen la prezoj por unu semajno : ĉambro kaj 3 manĝoj tage
La feriejo taŭgas por rulseĝuloj
1 persono en unupersona ĉambro : 431 €
1 persono en dupersona ĉambro : 340 € *
1 persono en tripersona ĉambro : 298 € *
prezoj por infanoj laŭ peto
* se eblas kompletigi ĉambron

*Logement : plusieurs possibilités*
- *Au « Lazaret », prix pour une semaine : chambre et 3 repas par jour*
*Locaux adaptés pour fauteuil roulant*
*1 personne dans une chambre d'une personne : 431 €*
*1 personne dans une chambre de 2 personnes : 340 € **
*1 personne dans une chambre de 3 personnes : 298 € **
*tarif pour enfants sur demande*
** si la chambre est complète*

**Mendo de loĝado: per antaŭpago de 230 € antaŭ la 01 07 2010**
- Eblas tendumi en la ĉirkaŭaĵo
- Multaj hoteloj en la urbo, junulgastejo

***Réservation: après paiement d'un acompte de 230 € avant le 01 07 2010***
- *Possibilité de camping en dehors de la ville*
- *Nombreux hôtels en ville, auberge de jeunesse*

Aliĝoj, klarigoj, mendoj je : *Inscriptions, renseignements, réservations à* :
**ESPERANTO CULTURE et PROGRÈS: 10, passage J.Ferry FR-34290 SERVIAN**
**tel/fakso : 33 (0)4 67 39 16 30 jf.passarella@free.fr**

✂ ----------------------------------------------------------------------------------------

**36-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO** ***36ème Semaine Internationale d'Espéranto***
**SÈTE (Francio) 2010-08-21 / 2010-08-28** **ALIĜILO** **BULLETIN d'INSCRIPTION**

S-ro / S-ino Familia Nomo ……………………………………………………
*Nom* Persona Nomo ……………………………………………………
*Prénom* Adreso ……………………………………………………
*Adresse*……………………………………………………
tel : ………………………………… rete-*courriel* : ……………………………

☐ Mi loĝos en la feriejo « Le Lazaret »
*Je logerai à la Maison « Le Lazaret »*
Mi antaŭmendas unu liton *Je réserve un lit*
☐ en unupersona ĉambro *dans une chambre d'une personne*
☐ en dupersona ĉambro *dans une chambre de 2 personnes*
☐ en tripersona ĉambro *dans une chambre de 3 personnes*

☐ Mi ne loĝos en Lazaret sed manĝos regule tie
*Je ne logerai pas au « Lazaret » mais j'y mangerai régulièrement*

- Mi partoprenos la : *Je m'inscris au cours suivant :*
  - kurson por komencantoj *(pour débutants)*
  - paroligan kurson ( *2-ème degré)*
  - perfektigan kurson *(perfectionnement)*

Mi pagas la aliĝkotizon de
*Je paye l'adhésion de* .................. €
***KAJ*** la loĝmendon de
**ET** *la réservation de* 230 €

entute / *total* .................. €
☐ per ĉeko - *par chèque ci joint*
al **Esperanto Culture et Progrès**
☐ poŝte- *par virement au CCP* **MON 73 73 65 E**
☐ per UEA konto : **ecep-k**

## PERPIGNAN

***La asocio ESPERANTO, KULTURO kaj PROGRESO prezentas la literaturajn konkursojn « Poeziaj Ludoj de Rusiljono » kaj « Rusiljona Premio de Verkistoj » organizatajn de franca asocio «* **Groupe Poétique et Artistique du Roussillon** *» Poezia kaj Arta Grupo de Rusiljono .***

**La ĉi jaraj literaturaj konkursoj okazos kiel en 2008 kaj 2009 ankaŭ en Esperanto .**

La Poezia kaj Arta Grupo de Rusiljono en PERPIGNAN (Perpinjano- sud Francio) tradicie aljuĝas literaturajn premiojn franclingve, katalunlingve, okcitanlingve kaj hispanlingve.
En 2008, oni aldonis esperantlingvan premion, honore al S-ro René LLECH-WALTER.
En 2009, pligrandiĝas la nombro da Premioj kies partopreno eblas esperantlinve: la premio « René Llech-Walter », por la junuloj la premioj « Isabelle Robert » kaj « premio de Lernejoj » kadre de la « Poeziaj Ludoj » ankaŭ la premio « de Verkistoj ».
Malofte okazas ke ne-esperantista asocio organizas esperantajn premiojn. Gravas ke ni partoprenu kiel eble plej nombraj. Tiel la premioj fariĝos tradiciaj.
Pliaj informoj en la retejo: http://sites.google.com/site/konkursojenperpignan/
aŭ ĉe: Esperanto, Culture et Progrès 10, passage J.Ferry 34290 SERVIAN
kiu estas peranto pri la esperantaj premioj
**limdato de la sendado: la 31an de majo 2010.**

**27èmes JOUTES POÉTIQUES du ROUSSILLON**

**- *PRIX René LLECH-WALTER*** : Thème libre en **ESPÉRANTO** - Toutes formes acceptées.

Les frais de participation sont fixés à **17 euros** pour **six poèmes** ou **deux nouvelles**,

**- *PRIX « Isabelle Robert »*** :Prix réservé aux jeunes. Poèmes individuels. (Français, Catalan, Espagnol, **ESPÉRANTO**)
Deux sections :
A – Candidats de moins de 13 ans
B – Candidats de 13 à 18 ans
**Participation gratuite**.

- ***PRIX DES ECOLES*** : Poèmes individuels (ou collectifs, provenant d'un atelier d'écriture). **Participation gratuite**.
Mentionner le niveau de la classe, ainsi que la section correspondant à l'âge : A ou B
(en Français, Catalan, Espagnol, **ESPÉRANTO** )

**9ème GRAND PRIX ROUSSILLONNAIS des ÉCRIVAINS**

**- *SECTION « NOTRE ACCENT »*** : Texte rédigé en Catalan ou Occitan, ou **ESPERANTO (Toutes formes d'écriture)**

L' ouvrage non primé par ailleurs, édité ou composés après le 1er janvier 2008, devra avoir un minimum de *50 pages écrites* Les frais de participation sont fixés à **17 euros . JF P.**

**********************************************************************************

## Sète 2011
## Interasocia Renkontiĝo

De kelkaj tempoj ekaŭdiĝas ke ni akceptos kongreson en nia regiono: la ideo estas inviti la plej gravajn asociojn agantajn en la lando komune kongresi. En 2005 tia komuna renkontiĝo sukcese okazis en Bulonjo sur Maro. Ja temis pri jubilea kongreso memore al la fama Unua Kongreso okazinta samurbe unu jarcenton antaŭe: la organizantoj eĉ malakceptis malfruajn aliĝintojn, ĉar la salonoj ne povis akcepti tiom da ĉeestantoj. Ĉu aliĝos tiom multe da homoj al la kongreso okazonta en nia regiono ? Verŝajne ne, ja ne temas pri centjara jubileo. Tamen la fakto ke komune kongresos SAT-Amikaro, Espéranto-France kaj aliaj gravaj movadaj organizaĵoj lasas prognozi multenombran partoprenantaron. Kutime tiuj asocioj kaj kelkaj aliaj okazigas aparte ĉiujare printempe sian jaran kongreson. En 2009 SAT-Amikaro kongresos en Hilion (apud Saint-Brieuc) kaj Espéranto-France en Kaiserslautern (komune kun germanaj esperantistoj). Tiajn kongresojn partoprenas de cent ĝis ducent partoprenantoj. En komuna kongreso povus partopreni ĝis tricent homoj, kio ebligas pli ambician programon kun elstaraj kontribuoj de artistoj kaj de eminentaj prelegantoj.

Ĉar la projekto ja ekkonkretiĝas : landskalaj asocioj jam aprobis la projekton, loka komitato eklaboras: ĝi nomiĝas «LOKO», t.e. Loka Organiza Komitato. La «Interasocia Renkontiĝo» okazos en la feriejo «Le Lazaret» en Sète dum la Paska semajnfino de 2011 (de la 22a ĝis la 25a de Aprilo). LOKO jam havis du laborkunsidojn, la 15an de novembro en Montferrier (ĉe Monique kaj Serge Eysseric) kaj la 20an de decembro en Servian (ĉe JF Passarella). En la renkontiĝejo mem en «Le Lazaret», la 7an de februaro okazos la sekvonta laborkunsido en kiu partoprenos delegitoj de SAT-Amikaro kaj de Espéranto-France. LOKO bonvenigas ĉiujn helpoproponojn kaj invitas vin ĉiujn ĉeesti ĉi tiun laborkunvenon: vi tiel povos konatiĝi kun la planata kongresejo aŭ pli ĝuste aprezi kiel ĝi taŭgas por akcepti tiun eventon. Se vi volas partopreni bonvolu sinanonci antaŭ la 28a de januaro al J-François Passarella (04.67.39.16.30-jf.passarella@free.fr) por rezervado de tagmanĝo surloke (15€ pagebla surloke)


LOKO planis monatajn laborkunsidojn ĝis junio kaj skizis laborplanon por la tuta tempo ĝis la renkontiĝo kun difino de la farendaj taskoj. La precipaj respondecoj estas dispartigitaj inter anoj de LOKO :

- *Maria PEREZ kun Véronique LAMUR :* Financoj
- *Arno LAGRANGE kun Christian MOURÉ kaj Frédéric BOURQUIN :* Komunikado
- *Louis ENSUQUE kun Jeannine BONY :* Programoj, dispartigo de la salonoj, organizado de la inaŭguro de la spektakloj, teknikaj iloj, libroservo.
- *Arno LAGRANGE kun Floréal MARTORELL* (Vinilkosmo, Eurokka) : Spektakloj.
- Kleriga programo : Espéranto-France kaj SAT-Amikaro
- *Serge EYSSERIC kun Pierre TAUPIAC kaj Frédéric BOURQUIN*: Ekskursoj
- *Véronique BICHON* : Aliĝado
- *Jean-Francois PASSARELLA kaj Henryka OLEK* : Loĝado kaj manĝado
- *Monique EYSSERIC kun Hanna CAYZAC kaj Josée BOCCADIFUOCO*: Akceptado

Se vi deziras rilati kun LOKO bonvolu aliĝi al gugla grupo :

**http://groups.google.fr/group/loko2011** A. Lagrange

**JARA KUNVENO en VERGÈZE** **DIMANĈON 18an de Aprilo**




**ATENTU : NOVA DATO DE LA JARA KUNVENO:**

**DIMANĈON, la 18an de Aprilo en VERGÈZE ek de la 10a horo matene ĝis la 17a horo posttagmeze.**

**Gravas ke ĉiuj kiuj interesiĝas pri la laboro kaj la estonteco de nia federacio ĉeestos !!**

**Adresse de la salle: FOYER COMMUNAL- Place de la République**

**Tagmeze eblas manĝi surloke (kunportu vian manĝaĝon) aŭ en restoracio sur la placo de la République ( bonvolu sinanonci al Maria Perez y Sanz : 04 66 73 34 84) Ni atendas vin ek de la 9h30.**

*<u>TAGORDO</u> (provizora)*

- Morala raporto kaj financa raporto
- **Renovigo de parto de la komitato** (elektita en 2007): Maria Perez y Sanz, Véronique Bichon, J-François Passarella, Colette Carbonnel, Christian Mouré, Gilbert Santos (ne rekanditatas) kaj pro demisio de Jean Hénin estas do 7 komitatanoj por elekti aŭ relekti.
- **Elekto de nova estraro:** pro demisio de Frédéric Bourquin kaj Jean Hénin, ne plu estas nek prezidanto nek elektita redaktoro de SFS. La nuna estraro estas do: vicprezidantino: Véronique Bichon, sekretariino: Josée Boccadifuoco kaj kasistino: Maria Perez y Sanz. Novaj kandidatoj bonvenas!!
- Nia federacio kunorganizas **Interasocian Renkontiĝon de Esperanto ĉe Mediteraneo en Sète en 2011**. La LOKO prezentos raporton pri la preparado. JF Passarela.

21-24a de majo

FRANC-GERMANA KONGRESO 2010 EN KAISERSLAUTERN

## Aliĝilo (plenigenda kaj sendenda al Espéranto-France)

Familia nomo ..................................................

Persona nomo..................................................................................................

Naskiĝdato ................................................ Sekso ❑ vira / ❑ ina

Membro de UFE : jes – ne ...................................

Samadresulo(j)..................................................

Strato ...............................................................

Poŝtkodo ............... urbo ....................................

Ŝtato.................................................................

Telefono ............................................................

Ret-adreso ...........................................................................................

❑ mi ne akceptas ke mia adreso kaj retadreso aperu en la kongresa libreto.

**La aliĝilon sendu :**
- rete al kaiserslautern@esperanto-france.org
- aù papere al Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris
- ankaù eblas aliĝi rete, ĉe http://esperanto-france.org

**Pagojn sendu :**
- ĉeke aù ĝire CCP 0085535D020 al Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris
- aù al la UEA-konto de UFE "ufea-s" (nepre tiam informu la organizanton pri via pago !)

kaiserslautern@esperanto-france.org

## Kotiztabelo (elektu vian kotizon laù via situacio)

1) Plenkreskulo super 30 jaroj
   Ĝis 31-01-2010 : ❑ 45 € / ❑ 30 €
   Ĝis 31-03-2010 : ❑ 60 € / ❑ 45 €
   Post 31-03-2010 : ❑ 80 € / ❑ 60 €
   (la dua prezo estas reduktita kotizo por samadresulo/handikapulo/sensalajrulo).

2) Junulo (naskita inter 01-01-1980 kaj 31-12-1994) : ❑ 30 €

3) infano (naskita inter 01-01-1995 kaj 31-12-2004) : ❑ 10 €

4) Taga bileto
   Plena kotizo : ❑ vendrede 15 €, ❑ sabate 30 €, ❑ dimanĉe 30 €, ❑ lunde 15 €
   Redukt. kotizo : ❑ vendrede 10 €, ❑ sabate 25 €, ❑ dimanĉe 20 €, ❑ lunde 10 €

Mi aliĝas al la kongreso de Esperanto 2010 en Kaiserslautern.
Mi pagas mian kotizon laù la supra tabelo de ......... € plus ...... € donaco por la kongresa kaso, entute ....... € (donacantoj ricevos ateston por franca impoŝto.)
je la (dato) : .........................
al jena konto : ❑ UFE-konto (ufea-s) / ❑ per mia UEA-konto (precizigu "Kaiserslautern 2010")
aù ❑ per ĉeko. Subskribo :

Mi planas alveni je (dato : horo : ) kaj forveturi je (dato : horo : )
per aùto / trajno / ruldomo : Mi proponas ........ sidlokojn en mia veturilo.
Mi intencas partopreni en la movada foiro (vendrede vespere) por jena asocio :

# NI BONDEZIRAS AL VI BONAN NOVAN JARON

Tiu numero de via federacia bulteno « SUDFRANCIA STELO » estas la lasta de la jaro 2009- Ne forgesu reaboni paganta la aliĝon al via loka grupo aŭ rekte al nia kasistino Maria Perez y Sanz 13bis, rue Haute 30310 Vergèze (CCP 956-28P Montpellier- à l'ordre de: Fédération d'Esperanto)

**Jarabono: 8€ Aliĝkotizo al la federacio: 2€**

la 15-an de decembro en ĉeesto de ĉ. 70 homoj estis inaŭgurita Zamenhof-monumento en la urbo Herzberg am Harz, Germanio. Aldoniĝis bela nova Esperanto-vidindaĵo al la Esperanto-urbo.




# SUDFRANCIA STELO

Dulingva bulteno eldonita de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono

Bulletin bilingue édité par la fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon

**N° 191** 4a kvaronjaro **2009** 4ème trimestre 2009


SUDFRANCIA STELO

*Interasocia Renkontiĝo ĉe Mediteraneo paske 2011 en Sète En Lazaret*

